Aŭstria Esperantisto

Oficiala organo de Aŭstruja Esperanto-Delegitaro (A. E. D.), Esperanto-Delegitaro de Wien (E. D. W.), Tutmonda Esperantista Ligo Fervojista (T. E. L. F.) kaj Universala Esperantista Pacifista Ligo (U. E. P. L.)

2a jaro. No. 2 **Monata** **Februaro 1925**

Redaktejo kaj administrejo: Korneuburg apud Wien, Hovengasse 12, II, 13

Kunlaborantoj! Skribu legeble, retenu kopion, aktualaĵojn sendu ĝis la 1a de l'monato
Manuskriptoj ne resendataj.

Jarabono: Por Aŭstrianoj kaj Germanoj 30.000 aŭ. K, Alilandanoj 3.50 svis. fr.

LA PLASTIKISTO JOSEF JOSEPHU.

De *Hermann Menkes.*

Oni povas diri, ke la plastika arto de Wien evoluis laŭ vojo zigzaga. La baroko alportis floradon de la monumenta formo, kies lasta reprezentanto estis Fernkorn. Poste venis kun Tilgner epoko de la beletiĝo. Oni ekenkondukis malfruan rokokon, prenis stilon kaj stimulon el artarilate dekadenciĝinta Francujo. Ina ĉarmo, ne grandeco de l' simbolo, estis la neelparolita devizo. Ĉi tiujn laŭdancistajn baletfigurojn kaj la rigidajn formitaĵojn de reprezentado



Josephu en sia plastikejo.

el la naŭdekaj kaj pli postaj jaroj oni vidas ankoraŭ ĉie en niaj placoj kaj ĝardenoj. Oni faris Strauss-an muzikon en ĉiuj materialoj, kutimiĝis je ritma parado, kiu tute ne konvenis al ĉi tiu teknika, problemograva epoko. Estis arto, kiu plejbonkaze per maseco aŭ pli ol natura grando klopodis anstataŭigi la monumentecon. En la lastaj jar-



„La morto kaj la knabino."

dekoj fariĝis Rodin fruktodona ankaŭ sur la Wien-a teritorio. Oni turnis sin al la grandaj simboloj de ĉiohoma, ekkonis la veran esencon de la plastiko ne en naturalisma imitado, ankaŭ ne en pure dekoracia karaktero, sed en la laŭsimbola ideo. Oni formis la grandajn homarotipojn, ilian esencon kaj ilian tragikon, la malbenon kaj la grandon de l' homo de la gento Kajna. Ĉi tiu Wien-a arto estiĝis en slavaj provincoj aŭ en eksterlando. Kaj oni apenaŭ ion rimarkis de ĉi tiu fekondeco de la vastetenda koncepto kaj de la ideoriĉeco de la junaj talentuloj, ĉar la oficiala aprobo radikis ankoraŭ ĉiam en la tradicio kaj en senviva spirito. Pro ĉi tiuj kontraŭaĵoj nia urbo malriĉiĝis.

Wien-a granda plastika arto, je kiuj nomoj ĝi nun ankoraŭ alligiĝas? Je la unika de Anton Hanak, je tiu de ĉiam pli alten evoluanta Gustinus Ambrosi. Kaj ankoraŭ alia juna Wien-a artisto starigas sin en ĉi tiun, iom maldensan vicon Josef Josephu, kies lastfoja kreado vidatigis lin kiel novan esperon.

De tiu, en ĉarmeta dekoraciemo radikanta tradicio Josef Josephu devis antaŭ ĉio liberigi sin sur longa vojo, venki unue la skolon lin influantan. En la lastaj jaroj kvazaŭ ekvekiĝis lia tutpropra talento kaj liberigis lin de arĥaiĝinta, senesenca stilistiko. Tial fariĝis lia lasta kolektivekspozicio en la ejaro de „Hagenbund" ĝojiga surprizo. Josephu ankoraŭ ne tute atingis la celon, ankoraŭ mankas la plenaj signoj de artiste distinga personeco. Sed per delikata mano de l' artisto li trapalpis sin de la plaĉemo al akra grando, de la inklino por eta plastiko al vera monumenteco. Sed ritmo kaj melodio de ĉi tiu urbo karakterizas lian, ofte mirindan linion, ne perdigante al lia formo iom da forto kaj esprimo. Lia vizio estas plenigita per la tragikaj figuroj kaj homarsimboloj. Kajn kaj Abel fariĝas en pezega kaj tamen elinterna formado la esprimo de lia mondsento. Jen estas speco de elementa bildigo kaj grandgesta formo. La Wien-a stampo akcentiĝas en la molaj, harmoniaj konturoj

de liaj inaj figuraĵoj, en la teresenta korpeco de lia „Evo“ aŭ en la „Virina Torso“. Estas muziko kaj ideismo en ĉio ĉi tio, forta natursento kun simbola interpretemo. Kaj en ĉi tiu sintezo de sentemeco kaj abstrakto kuŝas laŭ mia opinio la plej forta flanko de lia promesiga talento. Kaj en lia delikata, zorge bildiganta artista mano.

Tradukis *Franz Zwach*, Wien.

„Torso.“

„Subigo.“

La artikolon kaj bildojn (publikigitajn en „Illustr. Rundschau“ n-ro 75, redakcio Wien VIII, Kochgasse 28) afable disponigis s-ro *Cäsar Segaiov*, la konata aŭtoro de „Klirrende Ketten“ (Tintantaj ĉenoj), romano el la liberigtagoj de Ruslando, eldon. Hübsch, Wien-Leipzig. La verko pruvanta de l' aŭtoro konon pri la rusa animo estas nun dramigata de li kaj sceneje prezentota en Wien.

LA ROZO.

De *Emil Ertl.*[1]

„Vi do ankaŭ promenu en la freŝa aero, paĉjo,“ diris Anjo. „Kial sidadi la tutan tagon?“

Ŝi preskaŭ ĉiam nomis lin paĉjo, kvankam li nur estis paĉjo de ŝiaj infanoj, sed ŝi ja ĉion vidis per la okuloj de siaj infanoj.

„Kien vi iras?“ Oskar demandis distrite.

„Al la festo por la publika bono. Oni almenaŭ dumvespere estas iomete ĉirkaŭita de verdajoj. Kaj la infanoj kompreneble volas vidi la foiron.“

„Kompreneble, jes, jes, iru nur,“ li diris kvazaŭ revante.

Manjo, la naŭjara knabino, kaj la dekdujara Rudolf malfermis la pordon kaj hezite ŝovis sin en la laborĉambron de la patro; ŝi en helflava pajlĉapelo, kun nudaj gambetoj kaj duonŝtrumpoj,

[1] Emil Ertl, bone konata aŭstria verkisto. Aliaj verkoj de li estas „Neuhäuselhof“, „Popolo je laboro“ kaj la historia romano „Karthago“.

li jam tutvirece en longaj pantalonoj, marista kostumo kun ĉielblua kolumo. Ekstere oni aŭdis la mallaŭtigitan voĉon de Grenjo: „Ne eniru! Paĉjo ja devas labori.“

„Fermu la pordon, mi petas; trablovas!“ vokis paĉjo. Manjo kaj Rudolf volis resalti, sed panjo diris: „Nu, eniru rapide! Paĉjo certe permesos, ke vi diros adiaŭ al li.“

„Ja certe,“ li diris kaj nervoze pentris spiralaĵojn sur la marĝenon de folio, sur kiu li ĵus skribis. „Adiaŭ kaj bone amuziĝu!“

Nun ankaŭ Grenjo eniris, la timetema grandokula infano, en sia pajlĉapelo kun blankaj rubandoj. Laŭvice ili kisis lin sur la vangon, unue Manjo, poste Rudolf, fine Grenjo kaj foriris dece kaj rapideme. En la autaŭĉambro panjo diris: „Dio, kia aro da gazetoj kaj leteroj! Enportu ilin, Grenjo!“

„Kio estas denove?“ Oskar ekscitiĝis.

„Nur gazetoj kaj leteroj,“ la knabino diris, kvazaŭ por senkulpigi sin.

„Mi dankas, bone, metu ilin tien!“

Post kiam la infano foririnta estis, li ŝirmalfermis la kovertojn kaj de la gazetoj li forprenis la banderolojn, poste li ekbruligis cigaredon kaj promenigis la lertan okulon super presaĵojn kaj skribaĵojn. Kelkfoje dume li frapetis per la manplato sur la skribotablon. Ke do ĉiam ekestis novaj skandaloj, malkomprenoj kaj malicaĵoj! Sed kion oni povas fari kontraŭ tio? Nu, oni devas batali kaj defendi sian konvinkon. Precize tion oni nomas vivi.

Je la dekstra mano dekduo da bone pintigitaj krajonoj Kohinoor 4B kuŝis sur la skribotablo unu apud la alia; maldekstre arego da papero, ĉiu estis kvazaŭ pretigita folio inkvarto. Estis la tasko de la malpli juna knabino, Grenjo, restigi en ordo tiujn provizojn. Ŝi estis unu el la silentaj mastrumantinoj, kiujn oni ne aŭdas, ekĝermanta, plej intensa virineco; unu el tiuj infanoj, kies hararon oni volus trankvile kisi, dirante: „Benata estos, kiu iam edzinigos vin!“

Ĉiumatene, antaŭ kiam paĉjo eniris sian ĉambron, ŝi distrancis la paperon kaj pintigis la krajonojn, da kiuj ĉiam devis esti dekduo. Kelkfoje okazis, ke la venintan matenon ĉiuj dekdu estis senpintigitaj. Ŝi ordigis ilin denove, poste kuŝigis ilin unu apud la alia, tiel ke ili aspektis kvazaŭ lancoj en deponejo por ulanoj. Sammaniere ŝi replenigis la provizon da papero, kiel la Danaidoj replenigis la barelon.

Se Oskar skribante trovis fizikan malhelpon, tio povis furiozigi lin. Pro tio li aranĝis la aferon tiel. La paperon oni nur bezonis preni folion post folio, kaj kiel la pinto de Kohinoor 4B glitas sur bone glatigita papero, tio estas tute unika, senkompara. Ĝi skribas preskaŭ senpere.

Ĝuste nun, dum Oskar tiel sola kaj sen malhelpo sidis antaŭ la skribotablo, la pensoj ree flamigis lin. Tion en la gazetoj presitan, li neniel povis toleri; nek li, nek lia partio. Tion oni devis radike refuti. Per alloga objektiveco, sed tamen samtempe temperamente, trafe kaj sprite. Tia lia artikolo sur okulfrapanta loko presita en unu el la gazetoj je lia dispono distrancis la aeron kiel enmartelanta klingo, bone akrigita kaj penetrema kaj malgraŭ tio gracia.

Kiel liaj vortoj kvazaŭ torente fluis sur la paperon pro lia konvinko. Ĉiukvaronhore krakis krajona pinto kaj tuj la kriplulo estis flanken ĵetata kaj alia anstataŭis lin el la armeo, kiu atendis envice kiel batalemaj soldatoj ĝismorte kuraĝaj.

Kaj kun la krajonoj flugantaj en la angulojn de l' skribotablo ankaŭ la tempo forflugis, sen ke li sentis, kaj li preskaŭ miris, kiam iom post iom apenaŭ rimarkebla krepusko eketendiĝis ĉirkaŭ la skribotablon kaj kiam subite ankaŭ la infanoj revenis de la publika festo, la tuta „bruantulaĉaro“.

La infanoj en sia petoleco ignoris la severajn ordonojn, kiujn panjo ĉiam enradikigis en ilian memoron, nome, konsideri la ĉambron de paĉjo kiel sanktejon. Feliĉegaj ili sin ĵetegis enen, plenaj je travivaĵoj ĉirkaŭpremante lin;

li aŭdis ilin rakonti, raporti, priskribi kaj tamen li ne aŭdis ilin; liaj pensoj iris en tute alia direkton. Li babilis kun ili kaj eĉ ne havis scieton pri tio, kion li diris; li nur ĉiam pensis al sia laboro, kiun li volis kvazaŭ kroni; kies lastaj pensoj, kies plej efikaj tezoj staris tute klare antaŭ lia spirita okulo kaj kiujn li tamen ĝis nun povis nek kapti, nek fiksi. Neniel li volis lasi ilin malaperi. Ho, volonte li estus fininta sian laboron antaŭ la ekmalheliĝo; la vespermanĝo naŭzigis lin, se li ne estis fininta. Kaj tial li tre ĝojis, kiam li aŭdis la voĉon de sia edzino: „Lasu nun paĉjon trankvila, li devas ankoraŭ labori!"

„Nur kelkajn minutojn," li diris dankeme.

Duonhoron poste li tute gaje sidis kaj vespermanĝis kun sia familio. La artikolo ne nur estis finita, sed eĉ en la leterkesto kun koverto kaj poŝtmarko. Li estis kontenta pri sia verko. Ĝi trafis! La vojo estis libera! (Daŭrigota.)

POEMO de HEINRICH HEINE.

Du krurojn donis al ni
Por progresi sinjoro la Di'.
Ne volis li, ke sur la terbulo
Gluiĝu homaro, la movemulo.
Por esti kvietsklav' — ho terur'! —
Sufiĉus al ni nur unu krur'.

Esperantigis *Senio Weingast*, Wien.

NI NE ĈESAS ĜENI VIN!

Ni volonte plendus pri vi, karaj samideanoj, se ni scius, ke oni per plendoj ŝanĝas faktojn. Anstataŭe ni laboras.

Ĉu vi ne deziras imiti nin? Plendoj venis pro manko de raportoj pri la movado en Aŭstria (radio, grupoj, kursoj k. t. p.) en nia gazeto.

Sendu ilin!

Ĉu vi ne miris pri la senbildeco de la lasta numero? Ne miru, sed sendu al ni pagitan anoncojn kaj abonmendojn.

Pri nia volo plendi vi ne havos kaŭzon. *La redakcio.*

ESTRO DE SIAJ MUSKOLOJ.

Sensacia prelegprezentado de s-ro univ. prof-ro d-ro *Julius Tandler*, Wien.

La eminenta anatomo de la universitato Wien, prof-ro Tandler, aperis antaŭ kelkaj tagoj ĉe siaj aŭskultantoj akompanate de altkreska, proks. 40jara viro, kiu estas kuriozulo. La profesoro lin konas jam depost pli ol du jardekoj kaj aparte por tiu prelego venigis lin el Berlin.

Prof-ro Tandler, entuziasme salutata de la multnombra aŭskultantaro, enkonduke menciis, ke verŝajne tiu homo estas unikaĵo pro siaj povoj, kiuj estigas lin taŭgega objekto por la studo de l' plastika anatomio kaj de la muskolfunkciado.

Li povas alilokigi sian normalsituan koron tiom dekstren, ke la pulsado de la korpinto videbliĝas en la brustkaveto; krome li povas malrapidigi ĝian pulsadon.

Se li kuntiras la rektajn ventromuskolojn kaj malstreĉas la flankan muskolaron, aperas la fenomeno de l' tiel nomata Dupuytren-a ventro (protuberancoj sur la flankaj ventropartoj). Per kuntiro de l' tuta muskolaro en la malsupraj ventropartoj li translokigas la intestojn en la supran ventroparton kaj nerve malfunkciigas samtempe la diafragmon tiom, ke per la premo de l' intestaro la brusto estas ege elpremata.

Per fiksigo de sia diafragmo li povas fariĝi antendenan parton „punctum fixum" Per aŭtosugesta imagado de granda malvarmo li sukcesas efektivigi sur la brako „anserhaŭt"-staton kaj bone videblan starigon de la haroj per kuntiro de la harstreĉmuskoloj.

Oni do ankaŭ kredos, ke li pro la arbitra regeblo de sia muskolaro povas okazigi diversajn mienŝanĝojn en sia vizaĝo. Ekzemple li ŝajnigas samtempe ridi per unu vizaĝduono kaj plori per la alia. Multpintaj muskoloj kaj ĉiu unuopa ekstremaĵo de ili estas de li kuntireblaj kaj tiel senpere observigeblaj.

Per kuntiro de la brustalliga parto de l' diafragmo li internen tiras la ekstremaĵon de l' brustosto tiel, ke ekestas la formo de funelbrusto.

Per kuntiro de sia dorsmuskolaro li „produktas" alterne dekstran kaj maldekstran skoliozon (kurbiĝon de la vertebraro) ĉe samtempa senmoveco de la pelvo. (El la restado de la „skoliozo" ĉe antaŭensinklino Tandler konkludas, ke restado de skoliozo ĉe sinklino ne estas senkondiĉe simptomo de ĝia fiksiĝo.)

Ankaŭ la fenomenon de „saltetanta kokso" li montras per speciala movo. Oni tiam sentas tute rimarkeble, kiel ĉe la movo de l' kokso la tegaj muskoltavoloj saltetas trans la grandan tuberon de la femoro (trochantor major).

Po unu okulon li povas bonvideble elpremi tiel, ke rezultas pozicio kiel ĉe negrava Basedow-malsano. Ĉe tio plivastiĝas la pupilo — ankaŭ se li samtempe rigardas helan lumon —, dum la alia pupilo ne plivastiĝas.

Li strabas per unu okulo alterne vizaĝmezen kaj eksteren.

Stranga estas la plena reciproka nedependeco de liaj muskoloj je la klinkaj strecĉflanko de l' supra brako; tia, ke li povas streĉi la „dukapan" muskolon de l' supra brako (biceps) dum malstreĉeco de la „trikapa" (triceps) kaj male.

La eksternormulo jam revojaĝis Berlin-on. (Verkita laŭ gazetraportoj.)

NOTO. Uzu tiun ĉi artikoleton, por atentigi sciencistojn inter viaj konatuloj pri Esperanto, pri Internacia Scienca Asocio Esperantista (I. S. A. E.; prez. s-ro Rollet de l' Isle, 35 Rue du Sommerard, Paris; ĝen. sekr. s-ro Rousseau, 4 Place de la République, Levallois Perret, Seine, Francujo; jarkotizo 0·5 dolaro sendota al s-ro Rousseau) kaj ĝia „Internacia konferenco por uzado de E. en la Sciencoj puraj kaj aplikataj" (Paris, 14—18 majo 1925). Varbu! Ni bezonas fortan ampleksan Sciencan Asocion! *Walter Smital*, Wien.

Esperantistoj arestitaj. La gazeto „Politika" raportas el Bracko (Jugoslavio), ke la tiea polica ĉefo arestigis tutan E.-societon, opiniante ilian verdan stelon sekreta revoluciula insigno. Post — kvar tagoj la gesamideanoj estis ellasitaj.

Ne plu ekzistas Ruslando! Laŭ cirkulero de la sovjetregistaro al la poŝtaj direkcioj de ĉiuj landoj oni skribu adresante poŝtaĵon al iu loko de ĝia regteritorio anstataŭ la ĝisnunan landindikon „Ruslando" la novan: „U.S.S.R." (t. e. Unio de la Socialistaj Sovjet-Respublikoj) por certigi la alvenon. Konata verŝajne jam estas, ke la urbo Peter(s)burgo (Petrograd) nun estas „Leningrad".

RADIO.

Nepre legu!

Absolute necese estas, ke ĉiu Esp. sendu tuj poŝtkarte al „Radio-Welt", Wien III, Rüdengasse 11, la deziresprimon pri Esp.-kursoj per Radio Wien.

Instigu ankaŭ viajn gekonatulojn — ĉu Esp., ĉu radioposedantojn aŭ ne! Ne prokrastu ĝin!

Esperanto kaj radio. Unu el la plej promesplenaj agadkampoj por la Esperanto-propagando estas tiu de la radio. Kun despli granda ĝojo ni povas raporti, ke la plej influa radiorevuo de Aŭstrio, „Radio-Welt" (Radio-mondo), kies ĉefredaktoro d-ro Ladanyi jam de longe simpatias kun nia movado kaj aktive partoprenis en la Wien-a Esp.-kongreso, malfermis siajn kolonojn por perioda E.-rubriko, redaktata de d-ro E. Pfeffer. La ĵus aperinta programartikolo estas de d-ro Pierre Corret, prezidanto de Internacia Radio-Asocio, Paris: „Esperanto la mondlingvo de radio", la venonta: „La lingva problemo de radio el amerika vidpunkto" estas de James D. Sayers, vicsekretario de The American Radio Relay League, New York. Oni povas esperi, ke dank' al la intensiva propagando en la radioaferoj ankaŭ la aŭstria sendstacio „Ravag" sekvos la ekzemplon de la ceteraj alilandaj radiostacioj kaj aranĝos baldaŭ Radio-Esperantokursojn.

Aŭstria gazetara servo.

Esperantistaj radio-amatoroj kaj -societoj estas insiste petataj, sendi al la redakcio de „Radio-Welt“, Wien III, Rŭdengasse 11, letere aŭ p. ŝtkarte dankesprimojn pro la malfermo de la E.-rubriko. (Rim. de la red.)

Radio sur la lumturoj. La gardistoj de lumturoj kaj de lanternŝipoj havas la plej solecan vivon, kion oni nur povas imagi. La angla maristara servo decidis tial, provizi ĉiujn lumturojn ĉe la anglaj bordoj kaj ĉiujn lanternŝipojn per radioakceptaparatoj, tiel ke la gardistoj per la aŭdado de diversaj amuzaĵoj dissendataj de la diversaj sendstacioj povas en sia soleco trovi almenaŭ ian distraĵon. Krom tio ili ekscias, ĉar ili estas ofte semajnojn kaj monatojn sen interrilato kun la ekstero, kio okazas en la mondo. Tiu akcepto havas nenion komunan kun la ceteraj instalaĵoj sendrataj en la lumturoj, kiuj servas por la sekureco de la ŝipmovado. Ili havas kiel celon ekskluzive la amuzon kaj klerigon.

Esperantigis *R. Čech*, Wien.

SPORTO.

Wien-anino internacia majstrino de l' glitilkurado.

Dimanĉe la 1. februaro nj. en Davos okazis la konkuro pri la virina majstreco de artista glitilkurado. La internacia, multe partoprenata konkuro finis per la venko de s-ino Herma Jarosz-Szabo, Wien, kiu tiel la kvaran fojon akiris la majstrintitolon de Internacia Unuiĝo por Glitilkurado de Virinoj. La venkoj ĉiufoje okazis tiel perfekte, ke oni prave povas paroli pri nedubinda supereco de la aŭstria kompare al la alilandaj konkurintinoj. Aŭkaŭ ĉifoje ŝi venkis kontraŭ unuarangaj diversnacianinoj kaj kvankam la plej eminenta germanino s-ino Brockhöft kaj la konata anglino s-ino Muckelt konkuris, kvar konkurjuĝantoj taksis s-inon Jarosz-Szabo inda je la unua rango. Nur unu preferis s-inon Brockhöft kaj aljuĝis al la Wienanino la duan rangon.

La finrezultoj estis: 1. s-ino Jarosz-Szabo (Wien), loknumero 6, 339·45 punktoj; 2. s-ino Brockhöft (Berlin), n-ro 9, 318·4 punktoj; 3. f-ino Böckel (Berlin), n-ro 18, 255·16 punktoj; 4. s-ino Muckelt (London), n-ro 20, 256·5 punktoj.

Ankaŭ en la rapidkur-konkuroj internaciaj (Davos, 1. februaro nj.) Wienano s-ro Polatschek venkis (1 dua kaj 3 unuaj lokoj). Dua estis s-ro Boot, Holandano.

(Laŭ „Wiener Sonn- u. Montagszeitung“ 2. febr. 1925 de *W. S.*, Wien.)

Aŭstruja Esperanto-Delegitaro

Kotizojn por A. E. D. kaj K.R. pagis: La societoj „Verda Taŭernstelo“ en Grossarl, „Leoben“, „Akademia E.-Unuiĝo“ Wien I, „Landunuiĝo de aŭstria esp. fervojistoj“ grupo Wien Nord, „Eldona Kooperativo“ Wien II por po 1; „Unueco“ Saalfelden, „Junularo“ Wien III, „Progreso“ Wien IX, „E.-Unuiĝo“ Korneuburg por po 2; „Danubio“ Wien VII, „Graz“, „Salzburg“ por po 3 delegitrajtoj. — Donacoj de „E.-Societo Salzburg“ 1 ŝil., s-ro N. N., Wien 2 ŝil.

Graz, Esperanto-Societo por Stirio. Vigla propagando por Esperanto per Radio La nomita societo mendis ĉe la eldonejo „Batalanto“ 500 flugfoliojn „Die Sprache des Radio“ kaj transdonis ilin al la diversaj radiofirmoj kun la peto, aldoni la folion al la radioaĵoj, aĉetotaj de la interesuluj. Tre rekomendinde! — La 21. februaro okazos la dua dancvespero „Sub la verda stelo“ en Staatsbeamtenkasino, Graz, Albrechtsgasse n-ro 5. Komenco 8a vespere. Gastoj invitataj. — La Esperanto-kurso en la polica lernejo sukcese daŭras. — Dum la kunvenoj (ĉiumarde) s-ro prof-ro Hainschegg prelegas sian tradukon de la romano: „La renaskiĝo de Melchior Dronte“ de Busson. — La Graz-a jurnalo „Grazer Montagszeitung“ deklaris sin preta, redakcie subteni la Esperanto-movadon en Graz. W. R.

Esperanto-Unuiĝo en Korneuburg, eldonanto de „A. E.“, aranĝos en kunvenejo gastejo Rand, Bisambergerstrasse, je la 8a vespere prelegojn: 19. februaro s-ro Altrichter „De Korneuburg al Helgoland“, Wandervogelfahrt (simila al „skoltmigrado“) en 1923, 26. februaro s-ro Steiner „Per ŝarĝtrajno trans Pollando al Rumanujo“, seriozaj kaj ĝojaj travivaĵoj

5. marto s-ro Bubeniczek „spritaĵoj“, 12. marto f-ino Müllner „traduka ĵoj el diversaj libroj“. — Plue sekvos prelegoj de membroj el kurso de jaro 1923/24, kies temoj ni publikigos en n-ro 3 de „A. E.“.

Zamenhof-festo en Salzburg. La Salzburg-a Esperanto-grupo festis publike, invitante ankaŭ neesperantistajn gastojn, la naskiĝtagon de nia Majstro samtempe kun kristarbfesto. Ĝi invitis eminentulojn de la urbo kaj lando. La ĉefajn personojn la prezidanto de S. E. G. invitis persone kaj uzis la okazon por rekomendi nian kulturan aferon. Konstatinde estas, ke li preskaŭ ĉie ricevis tre afablajn respondojn. La ĉefurbestro s-ro Preiss venis persone kaj eĉ klopodis alparoli la festkunvenon en Esperanto. Li esprimis sian ĝojon pri la senlaca kulturlaboro de la S. E. G. La ĉefepiskopo kaj la ĉeflandestro esprimis letere sian aprobon de la celoj kaj laboroj de S. E. G., kaj bedaŭron, ke ili ne persone povis veni. Tagĵurnaloj sendis raportiston. La muzikon, plena orkestro, prizorgis la Esperantistoj de la orgenfabrikejo „Cäcilia“. Esperantista operkantisto plibeligis la feston per belaj kantoj. Kvankam ĉeestis samideanoj el Bischofshofen, Freilassing, Reichenhall, Hallein kaj Traunstein, la plimulto estis neesperantistoj. Lokaj gazetoj laŭde raportis pri la festo kaj ankaŭ la financa sukceso bone plifortigis la grupkason, tiel ke ni kun ĝoja espero atendas nun pli viglan disvastiĝon de Esperanto en nia urbo. *Prof-ro d-ro F. Christanell.*

A. E. D.-grupoj en la liglando Salzburg. Salzburg-a Esperanto-grupo, 60 membroj. Ejo: Hotel Wolf-Dietrich, Wolf Dietrichstrasse; prez. Rich. Grössinger, dentisto, Elisabethstrasse 17. — „Unueco“, Saalfelden, 25 membroj. Ejo: Brauerei Blattl; prez. Hans Wallinger, fakinstruisto, Apoteko. — „Verda Taŭernstelo“, Grossarl, 10 membroj. Ejo: Popollernejo; prez. Karl Schnabl, instruisto.

Aliaj grupoj kaj izoluloj. Socialista grupo en Salzburg „Frateco“, kunveno kafejo Struber, Lehen-Salzburg, prez. s-ro Jos. Unrain, fervojisto, Linzergasse 35. Socialista grupo en Hallein „Frateco“, prez. s-ro F. Winkler, fervojisto, Hoher Weg 99. Esperantista rondo en Werfen, s-ro Jäger, Gastejo Gral. Alois Fink, Steueraufsichtskommissär, Tamsweg, Lungau. Johann Kain, Firma Schwan & Sohn, Zinngenbach bei St. Gilgen. Hugo Baminger, poŝtoficisto, Grossarl, Pongau. P. Emanuel Češka, Missionshaus, Schwarzach, Pongau. Hedwig Kisslinger, Bürgerschullehrerin, Bischofshofen, Pongau. Johann Wollschlager, Kaprun, Pinzgau Hans Stallinger, Hotel „Elektra“, Zell am See, Pinzgau. Albrecht Mathiaschek, Fachschulprofessor, Hallein, Burgfried 78. Elfriede Zapf, Privatlehrerin, Morzg 59 bei Salzburg. Dr. jur. H. Trigler, Oberndorf bei Laufen, Salzburg. Adelbert Eder, Novize, Stift Wilten bei Innsbruck. Joachim Mayer, Pfarrer, Walchsee bei Kössen, Tirol. Andreas Braun, Pfarrer, Virgen, Osttirol.

Esperanto-kursoj 1924/25.

1. kun speciala permeso de la landa lernejkonsilantaro en la gimnazio „Borromäum“, Salzburg; gvid. prof-ro d-ro Frz. Christanell; 16 lernantoj, kiuj ricevos cenzuron en la oficialaj jaratestoj. — 2. ĉe orgenfabriko „Cäcilia“ kun oficiala aprobo de la direktantaro; gvid. prof-ro d-ro Franz Christanell; 37 oficistoj kaj laboristoj de la fabriko. — 3. aranĝita de la policoficejo Salzburg; gvid. prof-ro d-ro F. Christanell; 24 policanoj, 15 ĝendarmoj, 5 kriminaloficistoj. — 4. aranĝitaj de „Salzburg-a Esperanto-grupo“: por komencantoj en ĉambro de ŝtata reallernejo, gvid. prof-ro Scheierl, 16 lern. finis en dec. 1924; nova komencas en febr. 1925. — 5. por progresintoj arang. en la klubĉambro; gvid. prof-ro F. Christanell; 18 gelern. — 6. por komercoficistoj sub protekto de Handelsgremium; gvid. s-ro Grössinger, komencos kun ĉirkaŭ 20 lern. laŭ la proponoj por la komerca eksperimento. — 7. por laboristaj gimnastikantoj, kiuj intencas partopreni la olimpiadon en Frankfurt; gvid. s-ro J. Unrain; 14 lern. en la laborista hejmo. — 8. por komencantoj en burĝa lernejo „St. Andrä“; gvid. s-ro J. Unrain, finis kun ĉ gelern. — 9. por progresintoj arang. de la laborista Esperanto-Unuiĝo „Frateco“ en la klubejo (kafejo Struber); gvid. la prezid. s-ro Unrain. — 10. en Aigen apud Salzburg; gvid. s-ro Jos. Unrain; 10 lern. en privata ĉambro. — 11. en Saalfelden, ĝis nun 3 por komencantoj, 1 por progresintoj kaj 3 por burĝlernejanoj en la burĝlernejo gvidataj de instr. Wallinger kaj Neumair, Hutegger kaj Plainer. — 12. en Grossarl, 2 kun 16 partopren. arang. de la grupo gvid. en la popollernejo instr. Karl Schnabl. — 13. Bischofshofen: en la burĝa lernejo gvid. s-ino instr. Kisslinger 2 kursojn. Partopr. 24 knaboj, 20 knabinoj. Rimarko: Sendube en aliaj lokoj de nia lando dum tiu ĉi jaro aliaj kursoj krome, pri kiuj mi ne ricevis sciiĝon. Ili anoncu sin!

Landestro: d-ro Christanell.

Esperanto-Delegitaro de Wien

Wien XXI, Am Spitz 14.

„Junularo“, Wien III, Radetzkystrasse 23, aranĝos prelegojn: 19. febr. s-ro Braun, 26. febr. s-ro Klein, 5. marto s-ro Ultmann, 12. marto s-ro Kozina, plue kurson por komencantoj en la lernejo, Wien II, Blumauergasse 21, kaj por progresintoj en la klubejo. Komenco 19. februaro je la 19a horo.

Ĝenerala kunveno de la grupo Wien de Tutmonda Polica Ligo. La 17. januaro 1925 okazis en nia unuiĝejo, VII, Karl Schweighofergasse 3, ordinara ĝenerala jarkunveno. Distr. insp. kaj grupestro Hirz malfermis la kunvenon, tre interese referis pri la granda laboro de la unuiĝo dum la pasinta, kongresriĉa jaro 1924 kaj akcentis la lingvajn rimarkindajn laborojn de la grupo, kiuj ebligis, dum la XVIa (7. ĝis 14. aŭgusto) helpi la fremdajn Esperantistojn. Laŭdinde nia tre honorata ĝen. prez. de Tutmonda Police Ligo s-ro H. Schober uzante mem ĉiun forton subtenis kaj akcelis ĉi tiun dejoron polican kaj permesis la portadon de blankaj rubandoj kun granda verda stelo sur la maldekstra brako al 50 policistoj. Tiu ĉi servado kaŭzis kiel „novaĵo“ admiron kaj la fremdaj Esperantistoj atakis la policistojn per demandoj. Ke tiuj ĉiurilate plenumis siajn taskojn, montris la multnombre al la ĝen. prez. senditaj leteroj, kiuj esprimis laŭdojn pri tiu dejorado. — Plue raportis estro Hirz pri la malfacilaj laboroj de l' Kongres-Komitato, kiu prizorgis ĉiujn antaŭlaborojn por la kongreso de Tutmonda Polica Ligo. Dank' al la plej vasta subteno flanke de niaj superuloj kaj al la unuiga kunlaboro de niaj membroj ankaŭ tiu por ni gravega kongreso senplende pasis. Ĉiuj partoprenintoj tre volonte rememoros ĉi tiun kongreson. La pasinta kongresjaro forigis ĉe multaj policistoj la dubon pri la utileco de E. kaj multaj antaŭaj kontraŭuloj aliĝis la ligon. Hirz finis sian paroladon instigante la membrojn al nova senlaca laboro, por ke la ligo prosperu. — La ĝisnunaj grupfunkciantoj estis unuvoĉe reelektataj. En la nomo de ĉiuj membroj distr. insp. Schneider dankis al la ĝisnunaj estraranoj pro la penige kaj sukcesriĉa laboro. — Fine rev. insp. Gaidosch referis pri la policesperantista movado en Wien kaj aliloke.

Michael Rafelseder, sekretario. *Franz Hirz,* grupestro.

Kursoj ĉe la polico. En novembro 1924 komencis E.-kursoj. Tri okazas en la grupkunvenejo (lunde, marde, merkrede je la 6a) kun 100 partopr., du en la polica malliberejo, IX, Rossauerlände 7-9 (lunde, ĵaŭde), kun 50 partopr., du ĉiusemajne en Schwarzenberg-kazerno, III, Marokkanergasse 4, kun 50 partopr.

Unua Esperanto-Unuigo en Wien I, Weihburggasse 12 (Kasino). La 6. februaro parolis s-ro Steinhauer „Humoro ĉe fervojo“, 20. februaro je la 7a parolos s-ro insp. Hirz „Mallonga historio pri malnova kaj nova Wien-a polico“.

Universala Esperantista Pacifista Ligo

Centro: Wien I, Hofburg (Aŭstrio).

„SI VIS PACEM, PARA BELLUM.“

A.: „Kara najbaro! Mi estas tre feliĉa, ke ni vivas en bona interkonsento. Jen kial mi aĉetis bonan bastonon. Rigardu!“

B. (esplorante la bastonon): „Efektive bonega bastono . . . Per ĝi oni povas facile trabati la kranion. Kiel tio ĉi estas bone, ke ni vivas en bonaj interrilatoj! Mi ankaŭ aĉetos al mi similan bastonegon, kvankam al mi estas tre bezonaj la monoj por mastrumado.“

Iom poste:

A.: „Rigardu, najbaro! Mi evitiĝis de mia bastono. Mi fordonis ĝin al tiu, kiu estas pli malmulte civilizita, ĉar, fin-fine, tio ĉi estas tro malĝentila maniero mortigi unu la alian per la bastonegeto. Jen la sabro! Per ĝi pli facile estas agi. Tio ĉi estas pli eleganta! Mi estas tiel ĝoja pri bonaj interrilatoj kun mia najbaro kaj pri nia paca vivo . . .“

B. (esplorante la sabron): „Jes efektive, estas tre bone, ke ni ŝatas la pacon! Sekve mi pro bondezireco ankaŭ havigos al mi sabron. Bastono — ĝi estas ja iomete . . .“

Ankoraŭ iom poste:

A.: „He, najbaro! Aliru rigardi! Vidu, ĉe mi estas pafilo. Ĝi senfine pli reala estas ol la sabro. Sed mi restigis

ankaŭ la sabron . . . ĉar niaj interrilatoj estas tiel pacaj . . . sed mi prenas ankaŭ la pafilon . . .“

Reveninte hejmen, B. diras al sia edzino: „Donu al mi iom da rubloj, mi aĉetos pafilon.“

Edzino: „Ĉu vi malsaĝiĝis? Pafilon? Mi eĉ ne havas la monon por vesti niajn infanojn.“

B.: „Hm! Prunteprenu iom . . .“

Edzino: „Sed mi jam nenion povas doni je kaŭcio . . .“

B.: „Niaj gefiloj kreskas kaj fortiĝas. Ili pagos la ŝuldojn, kiujn ni faras; ili ankaŭ cedos iom da profito sia, por pagi la procentojn.“

L' infanoj krias: „Sed ni estas tre malsataj . . .“

B.: „Silentu vi! Mi ne toleros malkontentecon. Mi amas la liberecon kaj al ĉiu el vi mi permesas malsati, kiom ĝi deziros, sed ĝi ne malkontentu!“

La patrino kaj l'infanoj ekploris kaj pro pura amo al paco estis donita al ili bona taŭzo.

Kaj tiel same jen daŭris ĉe la du najbaroj. Ili armis iajn el siaj infanoj, por pli bone vivi en paco, por konduki ĝis malriĉeco aliajn idojn kaj pafmortigi ilin per iliaj parencaj fratoj armigitaj, kiam la mizero kondukos ilin ĝis revolucio kontraŭ parenca aŭtoritato. Tiamaniere ili daŭrigis bezoni.

Konstante estis aĉetata nova armilo por aĉeto de ĝi troviĝas necesaj monoj, sed al malsatantaj oni rifuzas panon.

Ĉiujare la najbaroj akurate kredigas unu la alian je bonaj interrilatoj kaj je tio, ke la paco ne riskas esti rompata.

Kion do oni povus diri pri najbaroj, kiuj agas tiamaniere?

Oni ilin igus en malsaĝulejon aŭ en malliberejon pro turmentigo de siaj infanoj, sed . . .!!

Viktor Melentjev, Perm (U. d. S. S. R.).

Al ĉiuj amikoj en ĉiuj landoj de la tuta mondo!

Ĉar la „Pacifista Kunveno“ de U.E.P.L. en Wien decidis, ne arbitre elekti la naciajn sekretariojn de U.E.P.L. por la diversaj landoj, la estraro de U. E. P. L. nun petas la personojn, kiuj volas labori por la Ligo, doni la nomojn al la ĉi suba adreso. Ne estas ia honorfunkcio, sed ni bezonas laborpretajn homojn!!! Ni devas havi ĝis nia XVIIa jam laŭeble bone organizitan Ligon! Ni petas niajn kunlaborantojn, sendu la nomojn nur pere de la landaj Esperanto-organizoj, ĉar alie ni ricevus eble tro multe da nomoj por ĉiu aparta lando; la elekto estus por ni tro malfacila; nur la lando konas ja siajn anojn.

La rezultatojn ni publikigos en nia *oficiala organo* „Aŭstria Esperantisto“, en „Heroldo de Esperanto“ (E. T.) kaj en „Esperanto“ (Genève).

Pro grava kialo ni ne pli frue povis elsendi tiun alvokon.

Julia Isbrücker (Haag),
prezidantino.

Rudolf Michael Frey,
ĝeneralsekretario, Wien III, Bechardgasse 14.

RIMARKINDAJ PRESAĴOJ.

C i t a t a j estas verkoj ricevitaj en unu ekzemplero; por r e c e n z i g i ilin sendu po du ekzemplerojn.

ANONCOJ 3liniaj anonc. 7000 aŭ. K. Reklamo 1/1 pĝ. = 250 mil., 1/2 = 130 mil., 1/4 = 70 mil., 1/8 = 40 mil. aŭ. K; je 3foja enpreso 5% rabato.

Viktoro A. Melentjev, Perm (U. d. S. S. R.), Rusujo, poste restante, deziras interŝanĝi per il. pk., per esperantaĵoj diversaj kaj korespondadi pri la anarhismo. Al ĉiuj senprokraste respondas.

70 studentoj, 13—17jaraj, de la Bundeserziehungsanstalt en Traiskirchen deziras korespondi kaj ŝanĝi pm, il. pk. (pm. bildflanke). Adreso: Dir. d-ro Watzke (por Esperanto-studentoj), Traiskirchen, Aŭstrio.

Hugo Steiner, studento de supera teknika lernejo, Bisamberg 248 apud Wien (Aŭstrio), deziras koresp. pri sporto, fotografio, desegno- kaj pentroarto. Ŝanĝas pm. kaj helpmonon.

MARTO

OFICIALA ORGANO DE GERMANA ESPERANTO-LIGO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Enhavo nur esperantlingva. — Aldono: Mitteilungen des Bundes deutscher Esperantisten in der Čechoslovakischen Republik.

Jara abono: Aŭstrio 35.000 aŭ. K, Germanlando 2.50 o. M., Ĉeĥoslovakio 16 Kĉ, aliaj landoj 25 Kĉ.

Adreso: **„MARTO“, HAIDA** (Ĉeĥoslovakio).

Perloj de la Esperanto-literaturo!

La tradukaĵoj de d-ro Zamenhof, Grabowski kaj d-ro Kabe ree haveblaj!

Ni liveras jenajn verkojn:

Fundamenta krestomatio . .	40.000 K	Mazepa de Slowacki	16.000 K
Georgo Dandin de Molière	15.000 „	La interrompita kanto . . .	8.000 „
Hamleto de Shakespeare . .	24.000 „	Pola antologio	15.000 „
Ifigenio en Taŭrido	27.000 „	La fundo de l' mizero de Sieroszewski	8.000 „
Rabeno de Baharah de Heine	18.000 „	Fabeloj de Andersen	27.000 „
La Gimnazio de Ŝalom Alehem		Halka de Wolski	10.000 „
La Rabistoj de Schiller . . .	24.000 „	Vortaro de Esperanto de Kabe	40.000 „
La Revizoro de Gogol . . .	22.000 „	Esperantokurso por Germanoj	2.000 „
Marto de Orszeszko	46.000 „	Esperantokurso por Ĉeĥoj .	2.000 „
El Biblio: Eliro	15.000 „	Esperanto-poŝkalendaro 1925	7.000 „
Levidoj	15 000 „	Kolekto de la Esperantisto 17 numeroj po	2.000 „
Sentencoj de Salomono . .	10.000 „		
Predikanto	7.000 „		

Kontraŭ antaŭpago aŭ poŝtŝarĝo kun 10% por poŝtelspezoj.

Libera Esperantista Laborkomuno, Wien VII, Lerchenfelderstrasse 23

SUKERAĴISTO

ANDREAS DEISTLER

Del. de U. E. A.

Wien VII, Schottenfeldgasse 91

Granda elekteblo je sukeraĵoj, tortoj, bombonoj, ĉokoladoj k. t. p. por ĉiuj okazoj.

»CĔCILIA«

Österreichische Orgelbau
·A·G·

Fabrikado de
preĝej- kaj salonorgenoj, pianoj
harmoniumoj kaj
violonoj

Fabrikejoj:

Salzburg-Parsch, Gaisbergstrasse
Nr. 13a

Telegramadreso: Cäciliag Salzburg
Telefono: 302, Salzburg

Artistaj ĉefoj:

Akademiprofesoro V. Goller, Kloster-
neuburg, kaj katedralmuzikestro
Franz X. Gruber, Salzburg

//

La teknika gvidado estas en la manoj
de famaj fakuloj

Eldonanto: Esperanto Unuiĝo en Korneuburg (Redaktoro: Hugo Steiner, Korneuburg, Hovengasse 12). — Presejo: Gstaltner & Co., G. m. b. H., Korneuburg, Kirchengasse 3.